

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2014

Ĵaŭdon la 30an de oktobro

62a jaro

Kalendaro

Atentu: ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 4an de novembro (semajno 45) – *tirsdag*

Aronia / aronjo? Ni esperantigos artikolon el Interreto kun multaj fakesprimoj, sub gvido de akademi-ano Otto Prytz.

Aronia / Svartsurbær. Vi oversetter en artikkel fra internett med mange vanskelige ord. Veileder Otto Prytz.

http://www.rolv.no/urtemedisin/medisinplanter/aron_mel.htm

Lundon la 17an de novembro (sem. 47) – *mandag*

Pri vort-ordaj kapricoj de 'nur', 'ankaŭ' kaj aliaj adverboj, kiuj volas esti pli ol adverboj – kaj eble ankaŭ pri aliaj vort-ordaj demandoj. Gvidos Otto Prytz

Om ordstillings-nykker hos 'nur', "ankaŭ" og andre adverb som gjerne vil være mer enn adverb – og kanskje også om andre ordstillingsspørsmål. Ved Otto Prytz.

Mardon la 2an de decembro (sem. 49) – *tirsdag*

Interlingvistiko: studgrupo laŭ propono de la redaktoro de *Revuo Esperanto*, vd. p.3.

Interlingvistikk. Studiegruppe etter tilbud fra redaktøren av UEA-organet Esperanto. Se s. 3.

Lundon la 15an de decembro (sem. 51) – *mandag*

La Zamenhofa tago! Tago de la Esperanto-libro. Ĉiu prezentu iun libron.

Zamenhof-dagen. Litteraturkveld. Alle velger en bok og forteller om /leser fra den.

Mardon la 6an de januaro (sem. 2) – *tirsdag*

Esperoj kaj perspektivoj por Esperanto en 2015.

Perspektiver for esperanto i det nye året.

Kiel helpi malriĉajn triamondajn E-klubojn?

Hvordan hjelpe fattige Esperantoklubber i den tredje verden?

OKAZIS

Mardon la 2an de septembro

Reveninte post la Universala Kongreso en Argentino, unue Kjell Peder klarigis kiel fiuloj ruze ŝtelis lian dorsosakon surstrate en la kongresurbo, Bonaero, kaj li montris la multajn informilojn kaj ofertilojn kiujn li ricevis de aliaj kongresanoj. Poste Otto raportis pri la kongreso mem, precipe la klerigaj partoj kaj la multaj kulturaj eroj. La kongresa programo grandparte sekvis la tradiciojn, li diris, sed ĉi-jare mankis teatraĵoj.

Mardon la 16an de septembro

Vidar Skretting estas hejme en Oslo dum unu monato post pli ol jaro en Jordanio kaj antaŭ ol plustudi i.a. la araban du jarojn en Anglio. Li resumis por ni la historion de Jordanio post la starigo de la ŝtato Israelo en 1948, kaj rakontis multon interesan pri la interpopolaj rilatoj kaj la sociaj kondiĉoj, precipe inter rifuĝintoj, en Jordanio hodiaŭ.

Ni notis kelkajn vortojn kiuj kaŭzis heziton aŭ eraron: Jordano (la rivero), (Cis-)Jordanio, jordani-anoj, beduenoj, manifestacio, ŝtat-renverso (puĉo), nombro/ numero, flosi.

Mardon la 7an de oktobro

Kiel prezenti Esperanton al la

publiko? Ni ĉiuj povis kontribui per niaj ideoj kaj spertoj: Por atentigi pri Esperanto utilas T-ĉemizoj, kaj ankaŭ glumarkoj sur monuoj kaj valizoj. Oni povas rakonti pri siaj personaj bonaj spertoj el kongresoj, pri amikeco kaj renkontoj kun fremdaj kulturoj. Sed plej konvinke estas, kiam la "publiko" povas rekte observi homgrupon el sep landoj en senpena interparolado. Forte efikas demonstro de praktika apliko de Esperanto, ekz-e en faka kunlaboro aŭ komunikado en fremdlingva ĉirkaŭaĵo. Manke de tio, esploroj ŝajnas montri ke oni plej facile varbas inter junuloj per la lingvo mem; intereso pri la ideologio venos al ili nur post aliĝo al la movado.

Lundon la 20an de oktobro

Otto kaj Pilar plilongigis sian UK-restadon en Sud-Ameriko per postkongresa ekskurso de UEA al Patagonio kaj Fajrolando kaj antaŭkongresa vojaĝo propramana tra Ĉilio kaj meza kaj norda Argentino, kun fina vizito al Urugvajo. Estante hispanlingvanoj ili povis ĝui la lokan kulturon kien ajn ili venis, kaj ne bezonis Esperanton por orientiĝi. Tamen ili trovis E-klubon en Santiago, kie oni tre afable akceptis ilin. Kaj entute, afablajn kaj simpatiajn

homojn ili renkontis ŝajne preskaŭ ĉie. Malagrablaĵon ili spertis nur veninte hejmen, trovante ke la norvega Poŝto resendis al Argentino kvar pakaĵojn kun interalie la sonregistraĵoj el la vojaĝo. Feliĉe siajn multajn fotojn pri

arkitekturo kaj pejzaĝoj Pilar havis kun si, kaj povis montri al ni ilustre al la prelego de Otto.

Novaj vortoj: prociono = *vaskebjørn*, nazno, kalfatri (arabdevena).

El Revuo *Esperanto*, majo, p. 104:

Interlingvistiko por Esperantistoj

En 1914-1915 René de Saussure, unu el niaj pioniroj, iniciatis la lingvosciencan studon de nia lingvo, kaj tiam fakte komenciĝis nova fako, nome interlingvistiko, kies celo estas la komparo de diversaj internaciaj helplingvoj. Nia revuo [*Esperanto*] festas la centjariĝon per artikol-serio unu jaron longa, kiu enkondukas interlingvistikon al esperantistoj. Redaktas la serion prof. Federico Gobbo (Universitatoj de Amsterdamo kaj Torino).

La artikoloj estas fakaj sed leĝer-stilaj, kun bibliografio kaj sugestoj por ke lernemaj esperantistoj profundiĝu en la studadon de tiu gravega fako. Efektive, ili ankaŭ utilos por aktivuloj, kiuj interesiĝas pli pri disvastigo de E-o, sed ne tiom pri lingvoesploroj. Kial? Ĉar multaj argumentoj kontraŭ E-o havas kvazaŭ- lingvosciencan bazon.

Nia legantaro estas invitata krei lokajn studgrupojn por kolektiva lernado. Ĉiuj grupoj kreitaj estos anoncitaj en la venontaj numeroj de la revuo *Esperanto*. En Fejsbuko aliĝu al la grupo Interlingvistiko por Esperantistoj. <https://www.facebook.com/interlingvistiko>.

Ni akceptos la inviton, kaj dediĉos unuavice nian unuan decembran kunvenon al tiuj artikoloj kaj priaj diskuttemoj.

La artikoloj de Federico Gobbo aperis en revuo *Esperanto*, en la numeroj junia, julia/aŭgusta, septembra kaj novembro:

1. Interlingvistiko: unu vorto, multaj signifoj
2. La malfacila tasko klasifiki planlingvojn
3. La kunfluo de lingvoplanado kaj planlingvoj
4. La fratoj de Saussure kaj Esperanto

Info-budoj en foiroj?

Ĉi-semajnfine ni starigis inform-budon ĉe la Konferenco pri tutmondiĝo (*Globaliseringskonferansen*) en *Folkets Hus*. Tio donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)aj homoj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. Se vi scias / aŭdos pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

Statutŝanĝoj?

Laŭ la kluba statuto, §6, proponoj pri statutŝanĝoj devas esti ricevitaj de la estraro plej malfrue la 10an de januaro. Aliaj ensenditaj proponoj devas esti ricevitaj de la estraro plej malfrue tri semajnojn antaŭ la ĝenerala kunveno [do meze de februaro].

Fondaĵo Kjell kaj Aase Gustavsen

Ni memorigas pri la kluba Fondaĵo Gustavsen. Ĝi estis starigita en 2004 per granda donaco de Kjell (1915–99) kaj Aase Gustavsen por subvencii junularan aktivadon – precipe vojaĝojn por serĉi inspiron ĉe la E-movado en eksterlando, sed ankaŭ alian agadon el kiu povas profiti la Oslo-kluba junularo.

El la gvidlinioj: "*Støtte gis normalt bare til klubbmedlemmer under 30 år, men kan også i spesielle tilfeller gis til andre klubbmedlemmer. Medlemmene kan søke individuelt eller gruppevis.*" Petskribojn al la kluba estraro (per la oficeja adreso <oficejoAesperanto.no>). Ne estas limdato nun.

Ne okazis La librofoiro "Espero por pluraj" (*Håp for flere*) anoncita en la antaŭa *Bulteno*, ne okazis.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94

Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo al Sinsen.

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejoAesperanto.no
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).